# Finna Esperantisto

| 1a Jaro. 1a No. | Redakcio: Mag. J. A. Weckgell, Kazerna str. 1. Administracio: Ilarejo Esperantista, Helsinki | Aprilo. 1907. |
|---|---|---|



## EN LA KOMENCO.

Jam longe estas kaj en la ĉefurbo kaj en provinco sentata bezono de speciala organo por la esperantista movado en nia lando .

Post ke en Helsingforso la 25:an de Marto fondiĝis kooperativa asocio "Ilarejo Esperantista" kiu alprenos al si la eldonadon de esperantista gazeteto, la bezonaĵo ŝajnas esti proksima al sia realiĝo. Sed ne povante eĉ diveni la estontan abonantaron, la administracio tuj de komenco ne kuraĝas preni sur sin la respondecon kaj ekonomian riskon de presita gazeto. Jen la kaŭzo, kial la gazeto aperas en la modesta formo de mimeografita folieto.

Kio do estas nia celo? Mallonge :

1. la disvastigo de l' Zamenhofa lingvo inter niajn kunlandanojn;
2. la kunligo de ĉiuj Finnlandaj esperantistoj por komuna organizita laboro;
3. la gazeto kiel eble plej vigle sciigos pri la enlanda esperantista movado kaj laŭ ebleco ankaŭ pri la eksterlanda.

Sed por efektivigi ĉion la redakcio nature kalkulas je favora helpo de samideanoj. Tio okazas plej bone per oftaj korespondaĵoj pri ĉiuspecaj esperantistaj okazintaĵoj; kunvenoj de grupoj, kursoj, antaŭlegoj pri esperanto k.t.p. Insiste ni ankaŭ memorigas, ke kiu ajn esperantisto povas fortege propagandi por nia afero per varbo de abonantoj por "FINNA ESPERANTISTO"

Por deteni ĉion, kio povas esti malutila por la progreso de nia afero la redakcio konservas al si la rajton rifuzi skribaĵojn ofendantajn religiajn aŭ politikajn opiniojn de legantoj. Nur kontraŭ "neesperantismo" polemikaj artikoloj estos enpresotaj. Tiel same la redakcio havos la rajton korekti lingvajn erarojn de l' kunlaborantoj.

# Abonu

# Finnan Esperantiston!

La "F i n n a  E s p e r a n t i s t o" laŭeble aperos ĉiumonate. Nur komence la gazeteto konsistos el almenaŭ kvar grandaj paĝoj kun skribmaŝine skribita kaj mimeografiita teksto. Tuj kiam la abonantaro estos sufiĉe granda, la gazeto estos presita. En tiu ĉi jaro intencas la redakcio aperigi 8 numerojn kiuj kostos I markon 50 pennojn.

Ĉion koncernantan la redakcion oni sendu sub adreso : Magistro J.A.Weckell, N:I kaserna strato, Helsingforso; la abonojn(poŝtmandate!) kaj ĝenerale ĉiuspecajn ekonomiajn aferojn al Ilarejo Esperantista, Helsingforso.

Por la Redakcio

J.A.Weckell

ᵒᵒᵒ ᵒ ᵒᵒᵒ

## L I T E R A T U R O.

Literaturo pri aŭ en Esperanto estas sciate jam tiel ampleksa, ke sur la malmultaj paĝoj de nia gazeteto oni ĝin ja ne povas elnomi. Sed komprenebl la verkoj plej gravaj, aparte por esperantismo en nia propra lando, devas esti prezentataj al nia legantaro. Ni nun faras komencon.

Estas eble utile, ke ni nun iom parolas pri finnlingvaj lernolibroj kaj vortaroj, kvankam certe la plejmulto de finna esperantistaro ilin jam konas. La lastan aŭtunon aperis la dua eldono de lernolibro, verkita de niaj samideanoj en Jyväskylä kaj havanta la titolon "Kansainvälinen apukieli Esperanto. Kielioppi sekä esimerkki- ja harjoitussarja". Ĝi estas iom ŝanĝita kaj plibonigita kaj estas ankaŭ iom pli ampleksa(80 paĝoj) ol la unua eldono. Enŝteliĝis en ĝin ankoraŭ kelkaj korektindaĵoj, tamen ĝi pro sia oportuna amplekso kaj pro ekzercaro kun ĝi havas, laŭ mia opinio tre bone estas uzebla en komencaj lernadoj. Ĝia prezo estas 90 pennoj. — Antaŭ ne longe aperis "Esperanto-kielen oppikirja" de magistro Werner Andelin . Krom 3-paĝa tekstoprovaĵo ĝi enhavas nur gramatikon, en multaj rilatoj pli detalan ol la supranomita. Kun siaj 58 paĝoj ĝi apartenas kiel dua parto al la verko "Esperanto-opinnot", kies unua parto estas "Esperanto-kielen sanakirja". La lasta konsistas el esperanta-finna kaj finna-esperanta vortaro. La esperanta-finna vortaro enhavas preskaŭ nur la vortojn de Zamenhofa Universala

vortaro, sed la finna esperanta vortaro estas pli ampleksa(72 paĝoj), tiel ke ĝi bone-sufiĉas por unua bezono. Ni estas tre dankemaj al s:ro Andeŝin, ĉar li per siaj vortaroj, en kiuj ni ankoraŭ neniajn oftindajn malbonaĵojn trovis, forigis senteblan mankon. Domaĝo nur, ke la eldonisto metis la prezon de "Esperanto-opinnot" tro alte, ĝis 4 markoj. - A.A.Sola.

*** ***

## Jara raporto de "La Polusstelo"

prezentita al la jara kunveno 22/3-07.

Jen finiĝis l' unua jaro en la vivo de "La Polusstelo",jaro esperplena, jaro de l' unuaj paŝoj al nia malproksima celo. Ni por momento volu rememoriĝi la plej gravajn el tiuj paŝoj.

Kiel nia societo fondiĝis ?

Simile kiel plej multaj aliaj spiritaj movadoj tiel ankaŭ la esperantismo fariĝis iom ĝenerale konata afero en nia lando pli malfrue ol en ĉeflandoj de civilizacio. Troviĝis sciate kelkaj privatuloj, kiuj interesiĝis pri Esperanto, sed pasis deko da jaroj de apero de Esperanto, antaŭ ol komencis organiziĝi nia afero. Tiam, en la fino de l' antaŭa jarcento, ekzistis en nia ĉefurbo esperantista klubo, kiu tamen domaĝe baldaŭ mortis; iom pli malfrue naskiĝis en Jyväskylä esperantista societo, kies propagandistoj certe estis fervoregaj kaj havis prosperindajn planojn, sed malsukcesis pro la malfacilaj cirkonstancoj kiuj tiam premis tutan nian landon, kaj eble ankaŭ pro la malproksimeco de ilia societa sidejo; fine ,en la februaro 1905 fondiĝis"Klubo Esperantista de Finnaj Studentoj", ree en nia ĉefurbo.Estas kompreneble, ke en tiu ĉi klubo baldaŭ naskiĝis aŭ pli bone jam de komenco ekzistis la konscio, ke tia studenta klubo ne sufiĉas por nia celo, ke ĝi estos anstataŭigata de societo ĝenerala. Kaj unu cirkonstanco puŝis la klubanojn tion fari jam la vintron 1906. La klubo nome decidis organizi kursojn esperantistajn, anoncis en gazetoj - la anoj pensante, ke trideko da lernantoj estus bona rezultato. Sed alvenis kune 208 kursanoj! Kiam la kursdonantoj kun ordantaj vangoj skribis la longan nomaron, tiam ili ekvidis ,ke la tempo estas matura por fondo de ĝenerala societo. La 3:an de februaro komencis la kursoj, dividite en du sekcioj, la 18:an de februaro la direkcio de la studenta klubo kunvokis unuan ĝeneralan kunvenon por fondo de societo. Preskaŭ cent personoj kunvenis en universitata aŭditorio kaj unuanime oni decidis fondi ĝeneralan societon esperantistan en Helsinki. Oni elektis kvinpersonan komitaton por prilabori regularon; en la kunveno post du semajnoj ties propono estis diskutata kaj en la fonda kunveno la 18:an de marto fine aprobata. Tuj ek-

7.

skribiĝis 38 anoj. Tiam oni ankaŭ elektis direkcion, konsistantan el gesinjoroj s:ro Hj.Runeberg(prezidanto), stud.A.Harlin(vicprezidanto), librejisto W.S.Mäkelä (kasisto), stud.A.A.Sola(sekretario), fr:ino Helmi Paavola, magistrino Gerda Blom kaj magistro H.Lunelund.

La unua agadjaro de la societo nature ne povas montri brilegajn rezultatojn. Tamen ni ja ne estas fanfaronemaj, se ni diras ke ni ion provis fari por nia celo. - Unue kelkajn ĝeneralajn sciigojn.

La anaro de "La Polusstelo" konsistas nun el 68 personoj. Krom supronomitaj fondaj kunvenoj la societo havis dum la jaro 17 kunvenojn, ordinare vizititajn de 12 - 20 personoj. La kunvenejo estis dum la jaro 1906 en la universitato, dum 1907 ĝis nun restoracio "Reform" ĉe Norda Esplanada Str. 39. Blazonŝildo montras al preterirantoj la lokon. Kursojn esperantistajn la societo aranĝis, krom la du supronomitajn samtempe, kiujn ĝi heredis de la studenta klubo, ankoraŭ du aliajn, nome unu dum la lasta aŭtuno kun 44 kursanoj kaj alian dum nuna vintro kun 27 kursanoj.

Pri diversaj aferoj, diskutitaj aŭ solvitaj dum la agadjaro, ni notu la sekvantajn.

La societo elektis komitaton por prilabori finnan-esperantistan kaj esperantan-finnan vortaron. La komitato estas komencinta sian laboron por ampleksaj vortaroj.

Multefoje oni diskutis pri fondo de finnlanda esperantista gazeto. La plano ŝajnas esti baldaŭ efektiviĝonta.

Ankaŭ multefoje oni diskutis demandon pri ĝenerala kunveno de de finnaj esperantistoj. La societo decidis aranĝi en la fino de venonta aprilo esperantistan feston kaj kunvenon ĝeneralan.

La societo abonis por siaj membroj multajn gazetojn kaj fondis bibliotekon, enhavantan nun ĉirkaŭ 100 numerojn. La bibliotekisto estis s:ro A. Sandström, kiu ankaŭ funkciis kiel helpa sekretario.

La societo fondis konsulejon, proponitan de dua esperantista kongreso, kaj elektis s:ron A.Sandström kiel konsulon.

Pro la diskutoj en "La Polusstelo" estas en preparado kooperativa societo, kiu fondos esperantistan oficejon kaj eldonos gazeton.

Oni elektis komitaton, kiu prilaboru regularproponon al ligo esperantista finnlanda.

Jen la iom gravaj aferoj. Plej grave tamen eble estas, ke multaj anoj dum la jaro rimarkeble progresis en uzo de Esperanto kaj kelkaj eĉ kuti-

migis baŝo ĝin uzi.
~~[struck-out typed line]~~



Ni finigu per la vortoj : Esperanto vivu, kresku, floradu !

Helsinki la 22:an de marto 1907

A. A. Sola

SEkr. de "La Polusstelo"

˙˙˙ . ˙˙˙

La 28:an de aprilo.

La unua jarfesto de "La Polusstelo" , ĉu ĝi sukcesos ? Ĉu prosperos al ni, interesi neesperantistojn por nia bela celo ? Ni havas ankoraŭ tiel malmultajn fortojn en nia societo ! Sed tamen ni devas provi ion fari. La programo ankoraŭ ne estas definita. La komitato tamen provas fervore laboradi. Muziko - parolado - kantado esperante - deklamo - teatraĵeto - - - jen kelkaj detaloj.

Niaj karaj samideanoj kiel ankaŭ ĉiuj interesiĝintaj neesperantistoj en tuta nia lando estas invitataj honori tiun ĉi festenon per sia ĉeesto. Bedaŭrinde ni tamen ne povas preni sur nin havigi loĝejojn por niaj ŝatataj gastoj. Ili tion bonvole mem prizorgu.

Ĉar tiun ĉi tagon nia ĉefurbo verŝajne estos vizitata de multaj geesperantistoj el aliaj lokoj de nia lando, la societo "La Polusstelo" ĉe la sama okazo aranĝos diskutadon pri kelkaj gravaj aferoj konterne la esperantistan movadon ĉe ni. Komitato jam estas elektita, kiu preparos regular-projekton por la fondota ĝenerala ligo inter la grupoj finnaj. Kaj ni insiste petegas niajn samideanojn ensendi al la redakcio de "F. E." demandojn pridiskutindajn, se eble antaŭ la 25:an. Ni estos dankaj se ni samtempe povus sciiĝi, ĉu la proponinto mem preparos la demandon.

Ĉe la sama okazo ni ankaŭ intencas aranĝi malgrandan ekspozicion de esperantaĵoj ĉiuspecaj; libroj, gazetoj, poŝtkartoj, komercaj prezaroj, prospektoj k.t.p. Samideanoj, posedante ~~eksponinda~~ĵojn, kiuj eble povus interesi neesperantistojn, estas insiste petataj sciigi al ni pri tio kaj se eble ensendi la interesigilon al ni.

Kunbatalantoj, bonvenu ! Via ĉeesto estas tute necesa !

˙˙˙ . ˙˙˙

Albin Sandström.

ILAREJO ESPERANTISTA,

kooperativa societo s. g.

Ĉiutage fariĝis pli kaj pli sentebla la manko de bone aranĝita perejo por ĉiuspecaj esperantiloj en nia lando. Se vi volis aboni gazeton aŭ aĉeti librojn, vin minacis aŭ neakurateco de ordinaraj librejoj aŭ devo ilin mem rice-

ŝigi el eksterlando. Kaj ankoraŭ pli malutile estis, ke neniu faris verajn paŝojn por kontentige disdoni tiajn esperantilojn. Kiel eviti tiun ĉi malbonaĵon? – Ho, ni fondu oficejon! – Sed kiel ni ricevos fondan kapitalon? – Jam kelkaj privatuloj promesis helpeme malfermi sian monujon! – Sed ĉu privata entrepreno estas la plej konvena por tiaj ĉi ekonomiaj aferoj, kies la ĉefa celo estas utili ideaan movadon? Kaj ĉu nia esperantistaro ne kun pli granda konfido sin turnus al ia komuna oficejo? – Ni do fondu tian! Ni fondu kooperativan societon kiel tia estas permesata laŭ niaj leĝoj!

La penso estis elparolita kaj tuj la diskutintoj komencis ĝin efektivigi. Post kunveno de nia ĉefurba esperantista societo "La Polusstelo" la interesigitoj pli ĝuste diskutis pri la afero kaj la 25:an de marto oni kunvenis por definitive fondi la societon. La regularpropono , farita de s:ro A.Sandström kaj subskribanto, estis aprobata kaj la unua direkcio elektata. Akcio po 5 markoj tuj estis signitaj. Kiel nomo estis aprobata "Ilarejo Esperantista", kooperativa societo s.g."(s.g.=sen garantio, ĉar la akcihavantoj ne havas devon garantii por pagotaĵoj de la societo) Agadmanieron de "Ilarejo" al ni montras la dua regulo:"La societo agas tiel, ke ĝi eldonas; liveras, peras kaj vendas tiajn librojn gazetojn kaj aliajn permesitajn presaĵojn kaj artikolojn , kiuj povas en Finnlando akceli la disvastigon de la lingvo Esperanto, publikigita de doktoro L.Zamenhof en la jaro 1887:a kaj prezentita en la verko "Fundamento de Esperanto" Por tiu ĉi celo ĝi fondas oficejon aŭ malfermitan vendejon aŭ plurajn tiajn"

La tuta regularo de "Ilarejo Esperantista" kompreneble ne povas en tiu ĉi gazeteto esti enpresita. Estu tamen la kvina kaj la sesa regulo ankoraŭ cititaj. § 5. "Kiel ano de la societo povas esti privatulo aŭ grupo kie ajn en Finnlando. Aniĝemulo lasu,pri sia aliĝo kaj pri tio, ke li sin ligas je obeado de tiu ĉi regularo, al la direkcio de la societo skriban pravigon, atestitan de du konfidindaj personoj. Se la direkcio akceptas la aspiranton, fariĝas li ano de la societo tuj post elpaginte la akcian monon, fiksitan en §6, kaj li ricevas akcian libron, enhavantan notaĵojn pri la nombro de akcioj kaj la elpagita sumo" §6. "Ĉiu ano de la societo partoprenas en ĝi per dezirita nombro de akcioj po kvin(5:-)finnaj markoj. Akcia mono estas elpagota unufoje en daŭro de maksimume tri monatoj post akcepto de aspiranto kiel ano de la societo."

Tio ĉi eble jam sufiĉas por doni al niaj legantoj ideon de "Ilarejo Esperantista. Ĝia direkcio,konsistanta el studento A.A.Sola(prezidanto) gravuristo Karl Sundström(vicprezidanto),direktoro V.F.Gustafsson, librejisto W.Mäkelä, farmaciisto Aug.Mattsson,S:ino S.Wesén kaj S:ino A. Sandström, deci-

das tuj komenci agadon. La regularo jam estas ĉe guberniestro por oficiala akceptado kaj dume s:ro A. Sandström private en nomo de "Ilarejo" zorgas pri oficejo jam malfermita. Estas nur dezirinde, ke niaj samideanoj kiom eble plej multe aĉetu akciojn kaj en ĉiaj eblaj okazoj uzu nian komunan" Ilarejon Esperantistan

A.A.Sola.

ooo ooo
o

A L V O K O

Aludante al la artikolo ĉisupre, koncerne la fonditan kooperativan societon "Ilarejo Esperantista" ni insiste direktas al la esperantistaro en nia lando la jenan peton :

Aliĝu al la societo akciojn aĉetante, subtenu vian propran negocon.

Societoj kaj grupoj !

Rajtigu viajn riprezentantojn la 28:an de Aprilo noti akciojn por vi. Jam antaŭ-e petu blanketojn por aliĝo al la societo.

La direkcio de " I. E. "

ooo ooo
o

LA VIRINO.

(Hispana dialogo)

Viro: Ĉiuj virinoj estas egakaj:hipokritaj,
malbonkoraj,vantaj,fieraj,amŝanĝemaj.
Saĝegulo: Kaj via patrino ?
Viro: Ho! mia patrino estas sanktulino.
Saĝegulo: Kaj via edzino ?
Viro: Martirino.
Saĝegulo: Kaj via filino ?
Viro: Anĝelo da pureco kaj naiveco.
Saĝegulo: Vi malsaĝegulo! Vi do kredas,
ke la bona Dio fabrikis nur
viajn virinojn kaj poste
disrompis la fabrikilon !

E-dur.

Sur la monto.

(Finna popolkanto)

Sur la monto, sur monteto
domon mian konstruas mi.
Venu, venu, knabineto,
por partigi domet' kun mi.

Ne malĝoju, ke malriĉo
ĉiam ŝajnis gasti min;
eble ankaŭ la feliĉo
akompanos iam min

Sed se vi ne volus veni,
tuj de tie foriros mi,
ĉar vi devas ja kompreni:
vin do vidi ne povus mi.

E-dur

Finna Esperantisto

Ilarejo Esperantista per tio ĉi havas la honoron prezenti al la finlanda esperantistaro sian prezaron N:o I .

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| I. L. Zamenhof | : Fundamenta Krestomatio | | Fmk. | 4:- |
| 2. s:e | : Fundamento de Esperanto | | " | 3:- |
| 3. s:e | : Universala Vortaro | | " | I:IO |
| 4. s:e | : Ekzercaro | | " | -:85 |
| 5. Emilo Gasse | : Kurso tutmonda de Esperanto | | " | I:- |
| 6. + + + | : Esperanton Kielioppi | | " | -:90 |
| 7. V. Andelin | : Esp.kielen oppi- ja sanakirja | | " | 4:- |
| 8. P. Ahlberg | : Esperanto-svensk ordbok | | " | 2:50 |
| 9. P.Nylén | : Lärobok med öfningar (4:de uppl.) | | " | I:40 |
| IO. La Evangelio Sankta Mateo;trad. de W.B.Mielck kaj Fr. Stephan | | | " | -:75 |
| II.Propagandaj ŝlosiloj; svedaj-anglaj-francaj-germanaj-hispanaj-italaj;po 5 pennoj, 25 ekz. | | | | I:- |
| Signoj Esperantistaj | | | " | I:- |

Aliajn librojn ni laŭ mendo havigos. Niaj estimataj legantoj estas petataj mendante librojn ensendi monon poŝtmandate nur al la adreso:Ilarejo Esperantista, Helsingforso, samtempe nomante nur la numeron de la libro dezirota. Por sendelspezoj oni bonvole kunmetu ĉirkaŭ 10% de la prezo. Troan monon ni ĉiam resendos. Fine ni volus atentigi al niaj estontaj klientoj ke niaj prezoj ordinare estas pli malkaraj ol tiuj,postulitaj de la libristoj.

Baldaŭ aperos prezaro 2:a, pli ampleksa !

*** ***

Korektaĵo. La verko de mag. Andelin, priparolita supre en "Literaturo havas nun, la ambaŭ partoj kunbindite, titolon "Esperanto kielen oppi- ja sana kirja".

*** ***

R I M : Pliajn sciigojn pri la ĝenerala kunveno suprenomita ni sendos al finlandaj samideanoj, kies adresojn ni scias kaj ankaŭ al aliaj laŭ